V - 20208 / 1945 r.

ĜISVENKE
H. G.

Pacbatalantoj ĉiulandaj unuigu vin


# AŬRORO

**Tribuna Heroldo kaj centra oficiala monata organo de HOMAR-GVARDIO.**
Posedanto kaj eldonanto: HOMAR-GVARDIO-Centro, Vizovice, Ĉeĥoslovakio. — Ĉefredaktoro: Steleculo-Hvězdenský, respondeca redaktoro: Alojzo Svoboda. — Presis: Strojil, Přerov.

Jaro 1945. Vizovice, septembro 1945. Numero 2. Prezo K 3.—.



Foto Pelnoř, Zlín



**PIONIRO DE L' UNUA HORO:**
**fondinto de**
HOMAR-GVARDIO.

## Deklaracio de Homar-Gvardio

Ĉar en pasintaj tempoj la burĝaj faŝistoj kaj trockistoj, kiel same neŭtrala Esperanto-movado, anstataŭ unuecigi Esperantistaron, disigadis ĝin, precipe erargvidis kaj per falsaj doktrinoj frakasis unuecon de la Esperantistoj, leviĝis ni, gepioniroj de HOMAR-GVARDIO kaj destinis por ni tiun ĉi taskon:

I. Laŭeble fari interrilatojn kun unuopaj antifaŝistaj Esperantistoj kaj kun Esperantistoj inklinemaj al antifaŝista kulturo en ĉiuj kontinentoj kaj fondadi kaj organizi HOMAR-GVARDIAJN sekciojn laŭeble en ĉiuj landoj.

II. Pro la nomo de nia socialisma venko, inter ni estas bonvenata ĉiu Esperantisto kaj Esperantistino, simpla egale kiel klera.

III. Ĉiurimede kaj ĉiuforte ni penos propagi Esperanton inter la popoloj, en ĉiuj iliaj klasoj, precipe inter la laborularo, kies organizon ni kreas.

IV. Sur la antifaŝista fundamento ni konstruas firman internacian citadelon de la esperantista popolo. Tiucele ni organizas Geesperantistojn sendiference pri ilia sociala sentado kaj eldonante kulturajn gazetojn kaj librojn, ni celados klerigi kaj fratigi la homaron.

V. Klopodante akceli la efektivigon de nia ideo, ni sendados provizore senpage centran organon AŬRORO al niaj malriĉaj membroj. Nur estas necese, ke ili sciigu nin pri siaj statoj. Male ni postulas financan subtenon por la gazeto de la pli riĉaj personoj.

VI. Niaj membroj estas unukategoriaj — la aktivaj; honormembrecon oni povas atingi sole per eksterordinaraj meritoj por HOMAR-GVARDIO, kies oficiala lingvo estas Esperanto.

VII. Nia celo estas instruadi ĉiujn popolojn kaj edukadi niajn adeptojn, por ke ili fariĝu indaj gesocialistoj. En tiu ĉi konvinko ni gvidos la membrojn al plej altaj celoj de la majesteco, por ke ili fariĝu plej konsciaj, plej sindonemaj, plej memoferemaj, plej kleraj kaj plej kapablaj, kiel ekzemplaj pioniroj de la internacia avangardo kun la devizo:

PER ESPERANTO AL UNUECO
DE L' TUTA MONDO.

Vizovice, la 14an de aprilo 1945:

CENTRA PLENUM — KOMITATO
de
HOMAR-GVARDIO:
Prezidanto kaj ĝen.-sekretario:
T. Edoardo Steleculo-Hvězdenský, VIZOVICE.
Vicprezidanto: Vicsekretario:
Miloslao Kamas. Jakobo Maĥalek.
MEMBROJ de la KOMITATO:
Adalberto Řehák,
Jozefo Svoboda,
Alojzo Svoboda.

**Ĉu vi jam fariĝis membro de Homar-Gvardio?**
**Homar-Gvardio por vi, vi por Homar-Gvardio!!!**

# Eksono

Henriko Miĥalek.
Dolní Hanychov u Liberce.

Eksonis la fanfaro de l' Homar-Gvardio kaj eĥoj bruas tra la tuta mondo; ariĝu ĉie la kunlaborantoj por pliboniĝi la homaran sorton.

Sub nia verdstela standardo ekmarŝas niaj novaj batalionoj, armilojn ne en manoj, sed en la koroj plenaj de paco kaj konkordo. Nin gvidas la arda spirito de nia eterne kara Majstro kaj inda al li ni sekvantaroj faligos ĉiujn disigajn barojn. Estas nia kredo, ke venkos surtere feliĉiĝe la bono, se ĉiu plenumas la sanktan devon kunhelpi fratece, kunlabori fervore. Nia unika lingva ligilo Esperanto mirinde esprimas komunan sentadon kaj ebligas komunan agadon, regadon.

Eksonu la voĉo de l' koro, jubileu de homo al homo — amikoj. La horo venis por veriĝi la idealon. Pro la homara fratiĝo estu salutata »Aŭroro«, vojlumiganta heroldo de nia glora epoko.

29. 8. 1945.

# La arto en la popola demokratio

Jar. Melka, Praha.

al nia ŝtato estas plej kara, kies pova helpo nin savis de la sklaviĝo kaj de pereo.

La faŝismo gvidis la batalon kontraŭ la spiritvenko kaj justeco, kontraŭ la libero kaj por subjugi laborantajn popolojn. La faŝismo celis ekstermi popolan kulturon.

Rezervitaj kaj ordigitaj fortoj, formitaj de grandkapitalistaj parazitoj ekatakis kiel furioj, por ke ili por ĉiam disbatigu kaj ekstermu la progreson kaj civilizacion kaj ankaŭ la arton, pravan arton, kiu ne taŭgis por ili. Unue ili atakis en la landojn, kie anima vivo evoluiĝadis kaj kreskis progrese, demokrate, trans iujn ombrojn, kiel Francio kaj Ĉeĥoslovakio, kiuj devis provizore malvenki, ĉar ili por la panhitlerismo ŝajnis citadeloj de kontraŭstaro. Post granda franca revolucio komencis firma anima altiĝemo. Por la kulturo kaj arto, ĝi forigis antaŭjuĝojn kaj idolojn de nobelaj kaj feŭdaj koncentrejoj. De tiu periodo en Francio kaj en Eŭropo ekevoluiĝis bela, purigita arto, aperiĝis firmaj talentemuloj, kiuj dum alia situacio ne povus sukcesi. Francio estis kaj estos nia amiko eĉ en la estonteco aparte Francio revolucia riĉa en la kreado.

Lenin diris: »Revolucio estas nenia idilio, kiu ĝin ne volas, estas ĝia malamiko«. Kio estas malbona, tion ni devas forigi, kio estas bona, tion ni devas konstrui sur solidaj fundamentoj.

Bona radiko estas en la popolo kaj ankaŭ nobligita tradicio, kiu jam en pasinta centjaro spite al malfacilaj bataloj kun germanoj, konstruis grandan laboron.

Kiam niaj vekigintoj dum la cirkonstancoj tre malfavoraj, ne kiel kortegaj konsilantoj, sed kiel efektivaj spiritlaboristoj donacis al ni liberigitajn ideojn, jen ilestis niaj antaŭuloj.

Prudenta kaj honesta persono de Havlîček estis ekzemplo de kuraĝeco kaj antaŭvidemo politika. Li klare vidis germanan rancan politikon. Bona Neruda, Tyl, Arbes, Smetana en sia granda popoleco, en kiu popola koro ekvokis kaj satkantis. Aleŝ, Mánes, Purkyne kaj vico de aliaj bonaj artistoj ĝis nuna tempo, kiam sociala altiĝemo pli kaj pli leviĝadis. Oni ne povas diri, ke ĉi tiu konvinko malgrandigis ilian arton. Honoron kaj gloron al frue mortintaj artistoj, kiuj ne ĝisvivis finon de germana hieno. Domaĝe ke jam formortis iliaj vivoj, kiuj en ĉi tiu tempo plene valoriĝus.

Nun okazas tagoj de granda alfluo de la libero, ĉiuj artistoj konceptu, kie estas iliaj postenoj.

Ni volas havi nian propran arton. Ne elĉerpeblaj belecoj de la lando, niaj urboj, inspirigaj arbaroj kaj naturaj apartaĵoj liveras tiom da eblecoj al niaj belartistoj. Ankaŭ motivoj de laboro kaj popola vivo ne estas elĉerpitaj. Ferfabrikejoj, minejoj kaj ĉie ni bezonas vidi la verojn, rigardi fake, en ĉio trovi celon. Estas necese verki ne sklave, sed precipe kun vervo kaj amo, kiujn ni plej bezonas.

Laboro kaj verko estas reprezentataj antaŭ la popolo kaj neniu opiniu, ke la popolo ne estas matura kaj de ĝi kontentiĝos per surogato, kiel iuj volus senkulpiĝi. Por la artistoj estas necesa unueciga asocio, en kiu grupiĝos la artistoj de malsamaj esprimoj kaj labormanieroj, sed kun honesta ideo por kreado. Al ĉiu ni liveru eblecon, por ke li-ŝi verke esprimu kion li-ŝi scipovas. Kio estas malbona, tio malaperos, kio estas bona, tio kreskos kaj prosperos.

Belartistoj forlasos malplenan kaj sensignifan kreadon por komercaj interesoj kaj agentejoj, ĉar ne estos snoboj, kiuj aĉetadus tiajn verkojn kaj kaŝus ilin en ŝrankoj.

Estis jam sufiĉe da trompoj kaj malhonestaĵoj, per kiuj honesta arto estis malrespektita. Eĉ tion ni devas pli bonigi. Tiujn, al kiuj germana aĉet-avideco tiome plaĉis, ke pro nura pentrado ili forgesis tendencon, estos pli bone, se ni sendos ilin por ripozi.

Okazas frateca konstruigado de eŭropaj landoj, en kiuj, kiel grava faktoro, portas sian mision la arto. Ni kreos ne nur por plezuri kaj por glori, sed precipe por ĝuo kaj bono de laboristoj. Ĉiu justa civitano de ĉiu lando havas rajton uzadi kulturon, kiel panon kaj ĉiu laboranta artisto rajtas vivi en la mondo kiel homo kaj ne kiel sklavo nutranta sin per restaĵoj de la riĉulaj tabloj. Finiĝo.

# Saluto al Internaciaj fakaj kunsidoj

Kongresadas diversaj Internaciaj fakaj movadoj, lastatempe ni legis pri traktadoj de ministoj en Parizo, Nune renkontadas eĉ aliaj Internaciaj movadoj laboristaj.

Al ĉiuj ni deziras, ke iliaj traktadoj havu la plej bonajn sukcesojn, precipe tiuj celantaj unuigadon por tuta laboristaro.

Do ni kredas, ke la agadoj kaj traktadoj estos pli fluaj kaj sukcesplenaj, **se ĉiuj Internaciaj fakaj movadoj eluzus la servon de nia kara kaj facila Esperanto.**

**Ekagu per rekomendado de Esperanto en via faka rondo.** Ministoj, kaj aliaj sendu, se eble baldaŭ proponojn en Parizon por la 25an de septembro t. ĉ. jaron okaze de proponitaj kunsidoj (per via faksekretario de Centra fakkonsilantaro). Lg. Praha.

**Por Homar-Gvardia fondo donacis k-doj:** Mil. Kamas, of., Vizovice, K 300.—, Joh. Blaha, fakinstr., Zlín, K 110.—, Nekonatulo, Zlín, K 1500.—, Lad. Vlačil, amiko de Esperanto, Kostelec u Zlína, K 100.—.

**Homar-Gvardianoj en Prago:**

La 19an de aŭgusto je la 10½ horo okazis unua Homar-Gvardia membra kunveno en Domo de popola kulturo en Prago II. Estis elektita provizora komitato, kies prezidanto kaj H. G-Konsulo estas kamarado Jar. Melka, akad. pentristo, Prago XII, Krkonošská I. Regulaj kunvenoj okazas ĉiumarde je la 20 horo en la sama domo. Ni sukcesis ankaŭ en nia ĉefurbo konstrui nian pozicion kaj deziras al niaj pioniroj en Prago, ke ili prudente kaj celkonscil procedu en nia serioza laboro por bono kaj prospero de la popoloj. VIVU HOMAR-GVARDIO.

Steleculo.

T. Ed. Steleculo:

# Alarmigo

(Dua sceno de kvina akto de epopeo:
**De utopio al Panteono.)**
22-24-25-I-1944:

Adeptoj, mi vin ja bonvenas,
Nun kiujn Komuno sintenas
Sur bazo en ligo per faro
Kun celo al venko de l'raro . . .
Al vi jen, Adeptoj de Kreo,
Min kiuj ĉeestas kun feo,
Al vi jen, Adeptoj de Gloro,
Vin, kiuj unuaj de l'horo
Indignas min ronde per la arĉ',
Mi krias al foro kaj al larĝ':
Helpindaj proletoj en mondo
Alarmas min vigle sur fondo,
Por ke nur moviĝu ni fare,
Ke mortu faŝistoj barbare;
Pripensis vin longe la sino,
Nun rompu la barojn ruĝmino,
Pro kiu dum jaroj en la marĉ'
Mi spiris soifis sub la ŝarĝ':
Terura period' dum la plej
Ideon de Lenin mi nur hej
Eksemis kaj verŝis al semo;
Momente ŝanĝiĝu la temo,
Ke diru vin, fratoj, nur mi mem,
Min kio gravitis kun la em':
Dum longa, ho, tempo min ĝojo
En mizer' instigis sur vojo,
Ke fine ni venkos en rolo,
Persiste se gvidos nin volo;
Ekpaŝis mi sole de l'loko,
De kie min pelis nur moko;
Mi vadis en koto de ĉaso,
Min ĉie torturis frakaso;
Dum tagoj de l'teror' sub jugo
Adiaŭis mi am' en flugo . . .
Procedis mi sola en frosto,
Frostiĝis en korpo eĉ osto;
Konstante minacis min nigro,
Min rodis malsata nur tigro,
Pro kies kaŭzegoj la sano
Fariĝis kaduka sen pano:
Surkole skrofolo kaj plue
Okulojn minacis ĝi flue . . .
Distance de l'hejmo jen branĉo:
Skalpelo min savis per tranĉo:
Cikatroj naŭloke sur kolo
Min savis-subtenis pro rolo;
Bronkito min rodas en la gorĝ' . . .
Ne helpos kuracil', nek ravsorĉ'!
Bacilojn ne pafos ja ĉaso!
Nur varmo kun pano kaj graso
Prosperus la sanon efike;
Kordifekt' sinsekve tragike
Min premas sopire sen ĝojo,
Tiele direktas min vojo;
Post jaroj min fine en varmo
Ĝojigas la hejmo de ĉarmo;
Nur graso forestas en flanko,
Ĝin frandas Hitlero ĉe ŝranko;
Kun kredo mi plue en koro
Penfare sopiras al foro,
De kie Aŭroro de savo
Min logas al celo de pravo,
Pro kies mi venko sen ĉeso
Klopodas per mia progreso
Prepari la vojon en muĝo
Nur kaŝe al prava la Ruĝo;
Dum somer' profitas mi monon
Por vintre eluzi sezonon,
En kiu mi tempo en vervo
Gvardie pretiĝas pro servo;
Privata min farto el varmo

Forpelas eksteren al armo:
Pionir' atingas se kleron,
Do klere li poste la veron
Instruas al homoj pri vojo,
Tra kiu komuna al ĝojo
Alarme instigas Lenino:
La mondon brilegos la fino...
En tiu preparo, pro l' fido,
Mi kie postenis kun rido,
Fiestroj de l'urbo sen honto
Kuraĝis min peli al fronto,
Al fronto de l'labor' por bruno,
Minacis min ili per puno!!!
Sed ne! Ne! Vi ĉeĥoj de l'krimo,
Vi, falspatriotoj en ŝlimo!!!!!
Min pelas unika nur devo:
La samideanoj en revo
Delire sopiras sur fondo,
Ke venku Esperant' en mondo,
Pro kies mi celo sen veto
Leviĝis atake poeto:
Majorit' de l'mondo sen klero,
Parioj de l'soci' sur tero,
La feŭdaj gesklavoj sen movo,
Liberaj dungatoj sen povo,
Modernaj vendantoj de l'forto,
Modernaj la sklavoj sen vorto,
Ĉifonaj proletoj ĉe lukso,
Malsataj infanoj ĉe nukso,
Sen povo ĝin rompi per scio,
Al kiuj ne helpas vekrio,
Kadavroj de l'frontoj en sango,
De Hitler martiroj sen lango,
Patrinoj, infanoj en ploro,
Naŭziga »vidajo de gloro«,
Majorit' veanta sen savo,
Jen kiun minorit' per glavo
Turmentas perforte sen normo,
Min hirte vekigis el dormo:
Mi brave leviĝis de benko,
Por servi per helpo al Venko,
Al Venko de Regno de Gajo,
Al Venko de Regno de Majo,
Al Venko verdeca per rondo,
Ke floru ĝi pompe en mondo;
Ekstaris mi firme sur fondo,
Por fondi kaj gvidi en mondo
La verdan movadon per flamo —
Donante la vivon pro amo,
Pro l'amo kun raci' sen ĝemo,
Pro l'amo al ĉiuj sen hejmo
En mizer' jen kiuj en frosto
Malsate vekrias pro kosto,
Jen, kiujn per lukto Ruslando
Protektas en vivo ĉe rando;
Luktante Ruslando pro bono,
Ĝi luktas pro regnoj sen trono,
Ni Kiujn aspiras kun larmo,
Al Kiuj nin pelas alarmo:
Sur posten' gefratoj ekde nun
Vigliĝu kaj kuru al la sun';
Manmane kun Rusoj en ago
Flirtanta nin gvidu la flago:
Sur posten' alarme plu ni hej
Tamburu kaj tondru do nur plej:
Heroe ni marŝu en koto,
Ke sonu eĉ tero de boto;
Ni tondru sur tero per spito,
Ni tondru sur maro per sprito,
Por ke nur vekiĝu, pro l'ŝtormo,
Neŭtralaj verduloj el dormo!
En ĉiu kontinent' de l'mondo
Espere ekfloru la fondo:
Zamenhof per lingvo de dio
Ne cedos de sia medio;
Genia la Majstro de l'Arto
Nin benis per lingvo en starto;
Adeptojn varbigu la urĝo,
Neglekton forskuu la skurĝo,
Solulon admonu la volo,
Amason egale kontrolo;
Ni svarmu, alarmu, pro Vero,
Ni tondru kaj veku sur Tero,
Ni svarmu, alarmu sur Maroj,
Ni tondru kaj veku per Faroj,
Ni ĉie kaj ĉiun al celo
Incitu, incitu per Belo;
Fulmtondro resonu de roko,
Heziton repagu nur moko,
Nur celu, signalu principo,
Al venko akcelu langvipo:
Instruist', profesor', proleto,
Instruktor', filozof', poeto —
Indiku direkton el rondo,
Kiele do venki en mondo!
Gvardie aspektu vizaĝo,
Gvardie ravigu pejzaĝo,
Gvardie nur veku akuto,
Gvardio viv-ondu tra kruto,
Gvardio blasfemu en ŝtormo,
Gvardion formigu la normo,
Ke mondo cetera per sino
Aliĝu al nia Destino:
Edife odoru la floro,
Animon ekzaltu la gloro;
Racio kun Sperto aŭdace
Atakas-triumfas traspace:
Misio de Raro, pro ĝojo,
Unike valoras sur vojo:
Burĝaro kaduka en ranco
Formortas por ĉiam sen ŝanco;

Daŭrigota.

**Korespondado,** Anonco kostas K 10.—.

K-do Pav. Fr. of. Praha-XIX-Veleslavín, n/Hrad. potokem 110, dez. interŝangi let. kun s-no, s-ino en angla kaj rusa lingvoj. K-do Karger K., Svitavy, str. B. Němcová, 47, serĉas korespondinton k-don Goroŝkin kaj k-don Dron Voronin ambaŭ en Stalingrado kaj salutas ilin.

K-don Jar. Hošek el Zlin, vivantan en USSR mi alvokas por kunlaboro kaj salutas »Ĝisvenke«: Steleculo.

Henriko Miĥalek, reklamofakisto, Holní Hamyĥov 138, u Liberce, dez. kor. pri homara pacprogresado, interŝ. ĉiajn esperantaĵojn.

**Esperanto-librojn,** lernilojn kaj propagandilojn liveras BES, Potŝtejn.

**Kun fremdujo** interŝanĝas poŝtmarkojn Inĝ. L. Berger, Potŝtejn.



UNIVERSITNÍ KNIHOVNA TDK